

07

The American Esperanto Journal

OFFICIAL MAGAZINE OF THE
AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

ESPERANTO

AUXILIARY



LANGUAGE

INTERNATIONAL

Copyrighted, 1907, by the American Esperanto Association

Vol. I

JUNE, 1907

No. 6

The American Esperanto Association

(Founded 1905.)

Honorary President—Dr. L. Zamenhof.

President—Prof. G. B. Viles, Ohio State University.

Secretary—John Fogg Twombly, Brookline, Mass.

Treasurer—Stephen W. Travis, Jr., Tenafly, N. J.

Publication office of the American Esperanto Journal, 34 Green St., Brookline, Mass.

The American Esperanto Association exists for the following purposes:

- 1) To furnish information about Esperanto.
- 2) To provide students with proper books.
- 3) To provide certificates of proficiency in the language. Specimen examination papers sent for 10 cents.
- 4) To publish the American Esperanto Journal.
- 5) To unite with one another individual Esperantists and, especially, the Local Esperanto Societies.

Membership in the Association, including a year's subscription to the American Esperanto Journal, \$1.50. Send all membership dues to the Secretary, Am. Esperanto Ass., Boulevard Station, Boston, Mass.

AFFILIATED ORGANIZATIONS:

Help us and help yourselves by becoming affiliated with the American Esperanto Association. This will cost you only \$2.00. You will receive a year's subscription to the American Esperanto Journal, the name of your society and the name and address of your Corresponding Officer will appear regularly on the cover of the Journal. Send the necessary information and money to the American Esperanto Association, Boulevard Station, Boston, Mass.

Massachusetts Agri. College Esperanto Club, E. Victor Bennett, 25 No. College, Amherst, Mass.
Boston Esperanto Society, Edw. K. Harvey, Perkins Institution, South Boston, Mass.
Esperantaj Pioneroj, Aaron D. Wolpe, Perkins Institution for Blind, South Boston, Mass.
Brooklyn Esperanto Society, Durbin Van Vleck, 148 Hancock St., Brooklyn, N. Y.
Cantibrigia Esperanto Group, Mrs. Estelle M. H. Merrill, 45 Bellevue Ave., Cambridge, Mass.
Harvard Esperanto Society, H. R. Shipherd, 69 Dana St., Cambridge, Mass.
Esperanto Club of Chicago, C. E. Washburne, 553 Jackson Blvd., Chicago, Ill.
Leibnitz Esperanto Club, Adolph Kroch, 126 Randolph St., Chicago, Ill.
Univ. of Chicago Esperanto Society, Floyd B. Hardin, Middle Div. Hall No. 37, Chicago, Ill.
Esperanto Club of Ohio State Univ., Charles W. Park, Ohio State Univ., Columbus, Ohio.
Elgin Esperanto Group, Dr. Clara L. Todson, 23, The Spurling, Elgin, Ill.
Everett Esperanto Club, Mrs. F. F. Driscoll, 161 Cottage St., Everett, Mass.
Esperanto Society of Los Angeles, Ralph Bond, 232 S. Hill St., Los Angeles, Cal.
Kansas State Agri. College Esperanto Club, Andrew J. Wheeler, Manhattan, Kan.
New Britain Esperanto Club, Rolland B. More, P. O. Box 700, New Britain, Conn.
New York Esperanto Society, Stephen W. Travis, Jr., Lock Box 8, Tenafly, N. J.
Jamestown Esperanto Club, Leo V. Judson, 101 Wood St., Norfolk, Va.
First Nebraska Esperanto Club, Mrs. E. A. Russell, Ord, Neb.
Emory Esperanto Club, Ralph M. McGhee, Emory College, Oxford, Ga.
Philadelphia Esperanto Society, Lewis B. Lueders, 206 S. 41st St., Philadelphia, Pa.
San Diego Esperanto Society, C. A. Babcock, Jr., R. F. D. 1, San Diego, Cal.
Searchlight Esperanto Club, Dr. E. W. Newell, Searchlight, Neb.
Seattle Esperanto Society, Wm. G. Adams, 309 27th Ave., Seattle, Wash.
St. Louis Esperanto Club, Mrs. Meade C. Dodson, 4604 McMillan Ave., St. Louis, Mo.
Winona Esperanto Club, Rev. J. J. Cleland, 278 W. Fourth St., Winona, Minn.
Worcester Esperanto Society, Herbert K. Cummings, Polytechnic Institute, Worcester, Mass.
Portland Esperanto Society, Herbert Harris, "The Somerset," Portland, Me.
Esperanto Club of Rockland, Chas. Froding, 1216 20th Ave., Rockford, Ill.
Columbus Esperanto Society, M. Janet Rogers, 403 Luckhaupt Ave., Columbus, Ohio.
L'Espero Esperanto Club, Mrs. A. D. Bird, 40 Camden St., Rockland, Maine.

The American Esperanto Journal

Vol. I.

JUNE, 1907

No. 6

THE American Esperanto Journal is the official organ of the American Esperanto Association, and of the local Esperanto societies in Boston, Chicago, New York, Philadelphia, Los Angeles, Seattle, etc. It appears once a month, and will aim to be especially useful to beginners.

All writers to the Journal must observe the following rules:

1. Write legibly or, preferably, "type-write."
2. Use paper as large as that of the Journal.
3. Write only on one side of the sheet.
4. Leave large spaces between the lines.
5. Always send an English translation on separate sheets of paper.

The Editors reserve the right to correct and to reject all manuscripts. No manuscripts will be returned except in the case of articles rejected, and only then, when such articles exceed 500 words in length, and are accompanied by return postage.

The American Esperanto Journal is a "propaganda organ." The editors and other workers on it give freely of their time and labor; writers of articles must do likewise.

Address articles to the REDAKTORO, AMERICAN ESPERANTO JOURNAL, Boulevard Station, Boston, Mass. News articles should be addressed to the REDAKTORO DE KRONIKO.

AMERICAN ESPERANTO JOURNAL.

With membership in the American Esperanto Association.....\$1.50
Journal alone..... 1.00

Send all subscriptions to the *Secretary, American Esperanto Association*, Boulevard Station, Boston, Mass. Change of address costs 10 cents; no changes made during the summer months; your postmaster will forward your Journal during the summer for a few cents. Please address all complaints to the Secretary. The Journal does not regularly appear until the middle of the month; in July, August, September and October, not until the end of the month.

We have translated the following paragraph from a Spanish religious journal published in Mexico, "El Testigo":

"A worthy brother from Ontario, California, has asked us whether Esperanto has already been adopted by the world as the universal language."

"Certainly not; it is only now beginning to be accepted as such; but its progress is truly remarkable. The fact that it has not already been officially adopted does not prevent us from calling it the universal language, for this is what it purposes to be, not however to replace the other languages, but only to help them and to supply what is lacking in them. As there exist international laws, which the whole world has already accepted, but which have never been officially adopted, in some such way the international language Esperanto may hope to gain universal acceptance. We are not prophets: we simply observe that there exists no other language which so perfectly fulfills the necessary conditions as 'The beautiful auxiliary international language Esperanto.'"

Ni tradukis la jenan paragrafon de religia ĵurnalo hispana eldonata en Meksiko, "El Testigo":

"Honorinda samideano (frato) de Ontario, California, demandis de ni, ĉu la Esperanto jam estas alprenita de la nacioj kiel lingvo universala."

"Certe ne: ĝi estas nun nur en la komenco de tia akceptado, sed ĝia progreso estas vere mirinda. La fakto, ke ĝi ne jam estas tiel alprenita oficiale, ne malhelpas nomi ĝin 'la lingvo universala,' ĉar tia ĝi pretendas esti,—ne tamen anstataŭigi la aliajn lingvojn, sed nur helpi ilin kaj anstataŭigi iliajn mankojn. Kiel ekzistas leĝoj internaciaj, kiujn la tuta mondo jam akceptas sed kiuj neniam estas oficiale alprenitaj, tiel povas esperi atingi universalan akceptadon la lingvo internacia Esperanto. Ni ne profetas: ni nur rimarkas, ke ne ekzistas alia lingvo plenumanta la kondiĉojn necesajn tiel perfekte kiel 'La bela kaj helpa lingvo internacia—Esperanto.'"

Are there no other auxiliary international languages in existence? In one sense, yes; in another, no. Many plans, many projects have already appeared, especially during the last twenty years. The great majority of these have been based upon the same principles upon which Esperanto has been built. Yet almost all remain mere projects; their grammar has been outlined, but little progress has been made in regard to their vocabularies or to the formation of their words—*things much more difficult to work out satisfactorily*. Only one of them—“Idiom Neutral”—possesses a dictionary. It alone, therefore, can be considered, from any effective standpoint, a language; and even it must prove its capabilities by works written in it. To-day it does not possess such works; in fact the publishing of its first journal began only last year. Speaking then practically, one can say that to-day Esperanto is the only international language.

Is Esperanto then perfect? Certainly not; but it is easily learned, is now in actual daily use for all sorts of purposes, and is in principle founded upon the correct basis. We have already said that even the other projects of international languages have in general the same principles both in their structure and in the elaboration of this structure. Yet in two points Esperanto differs from them: first, in the distinctive terminations of the chief classes of words (o for the noun, a for the adjective, etc.); and, secondly, in regularity of word-formation.

The first point is not absolutely necessary, but it is convenient for beginners, and helpful to persons who are not acquainted with the languages of Western Europe. *The second point, however, is almost absolutely essential for an artificial international language*; it makes the language constructed with proper regard to it much more easy to learn and to use. For example, compare “homo, homa; tero, tera; naturo, natura; ĝojo, ĝoja” with “hom, human; ter, terrestrial; natur, natural; joy, joyous.” In other words, instead of having to learn four roots and one suffix, one would have to learn four roots and four suffixes; the labor would be doubled.

We speakers of English and of the Romance languages do not at first sight recognize this fact; for we are already accustomed to these irregularities—and usage is even more attractive than regularity. But this fact is of the greatest importance for the speakers of the other languages, and therefore must also be of the greatest importance for an international

Ĉu ne ekzistas aliaj helpaj internaciaj lingvoj? Laŭ unu signifo, jes: laŭ alia signifo, ne. Jam, aparte dum la lastaj du dek jaroj, multaj planoj, multaj projektoj aperis. La plejmulto el tiuj estas fondita ĝenerale sur la samaj principoj sur kiu estas konstruita Esperanto. Tamen, preskaŭ ĉiuj restadas nur en la projekta stato: oni estas skizinta la gramatikon de ili, sed ne estas ellaborinta la vortaron aŭ la vortformadon—*aferojn multe pli malfacilajn por kontentige ellabori*. Nur unu el ili,—la “Idiom Neutral,”—posedas vortaron. Nur ĝi tial povas esti konsiderata de iu efektiva vidpunkto kiel lingvo; kaj eĉ ĝi devos pruvi ĝiajn kapablojn per verkoj verkitaj en ĝi. Ĝis nun ĝi ne posedas tiajn verkojn: efektive oni ĵus komencas en la lasta jaro la eldonadon de ĝia unua ĵurnalo. Parolante do praktike, oni povas diri ke nun Esperanto estas la sola internacia lingvo.

Ĉu Esperanto do estas perfekta? Nepre ne: sed ĝi estas facile akirebla, estas nun efektive en ĉiutaga uzado por ĉiaj celoj, kaj principe estas fondita sur la korektaj fundamentoj. Ni jam skribis, ke eĉ la ceteraj projektoj de internaciaj linvoj kavas ĝenerale la samajn principojn en ilia strukturo kaj ellaborado. Tamen, en du punktoj Esperanto diferencigas de ili: unue, per la distingigaj finiĝoj de la ĉefaj klasoj de vortoj (o por la substantivo, a por la adjektivo, k. t. p.); kaj due, per regula vortformado.

La unua punkto ne estas nepre necesa, sed ĝi estas oportuna por eklernantoj, kaj helpa por personoj ne sciantaj la lingvojn de okcidenta Eŭropo. *La dua punkto, kontraŭe, estas preskaŭ nepre necese por artefarita internacia lingvo*: ĝi kaŭzis ke lingvo konstruita kun rigardado al ĝi estas multe pli facile lernebla kaj uzbla. Ekzemple, komparu “homo, homa; tero, tera; naturo, natura; ĝojo, ĝoja,” kun “hom, human; ter, terrestrial; natur, natural; joy, joyos.” Alivorte, anstataŭ lerni kvar radikojn kaj unu finiĝon, oni devus lerni ok radikojn: la laboro duobligus.

Ni, anglo-parolantoj kaj parolantoj de romancaj lingvoj ne unue rekonas tiun ĉi fakton: ĉar ni jam kutimiĝis al tiuj ĉi malreguloj—kaj kutimo estas eĉ pli loga ol reguleco. Sed tiu ĉi fakto estas gravega por la parolantoj de la ceteraj lingvoj, kaj tial devas esti ankaŭ grava afero por internacia helpa lingvo, *facila por*

auxiliary language, *easy for all*. Furthermore, even the different Romance languages do not always agree upon the proper suffix: for example, English length, French longueur, Italian lunghezza, Spanish longitud. However, Idiom Neutral, the only elaborated international language besides Esperanto, recognizes the importance of this point. It legitimately demands regularity in word-formation, *at least in principle*. It writes, for example, "repetasion, desidasion, visabl," etc., but it also allows the use of "repetision, desision, visibl." Why? In order to try to avoid forms distasteful to persons who are acquainted with Romance languages. However, it only partly succeeds in doing this, and only by making the language more difficult for all other persons. It is better to do as Esperanto does, to choose "indifferent" suffixes, and to use them absolutely without exception. "Ripetado, decidado, videbla," always the same—such are the words chosen by Esperanto, and one will not easily find better forms, *unless one wishes to sacrifice ease and practicability for all upon the altar of a useless attempt to unite regularity with irregularity*.

ĉiuj. Plie, eĉ la diversaj romancaj lingvoj ne konsentas ĉiam pri la konvena sufikso: ekzemple, English length, French longueur, Italian lunghezza, Spanish longitud.

Tamen, Idiom Neutral, la sola ellaborita internacia lingvo krom Esperanto, rekonis la gravecon de tiu ĉi punkto. Ĝi rajte postulas regulecon en la vortfarado, almenaŭ principe. Ĝi skribas, ekzemple, "repetasion," "desidasion," "visabl," k. t. p., sed ĝi ankaŭ permesas la uzadon de "repetision," "desision," "visibl." Kial? por peni eviti formojn ĉagrenigajn al personoj kiuj konas romancojn lingvojn. Tamen, ĝi nur parte trafas ĝian celon, kaj nur per tio, ke la lingvo malfaciligas por ĉiuj ceteraj personoj. Pli bone estas agi kiel agas Esperanto, elekti indiferentajn sufiksojn, kaj uzi ilin nepre senescepte. "Ripetado," "decidado," "videbla," ĉiam la samaj—tiaj estas la vortoj elektitaj de Esperanto, kaj oni malfacile povos eltrovi pli bonajn formojn, *se oni ne deziras oferi facilecon kaj praktikeblecon por ĉiuj sur la altaro de senutila provado kunigi regularecon kun malregulareco*.

(Information about Idiom Neutral may be obtained by sending 4 cents in postage stamps to Mr. B. Mackensen, Sec'y International Language Society of San Antonio, Texas, 123 Adams Ave.)

Esperanto, among its other uses, has proved to be a boon for the blind, and it will be a much greater one when Esperanto is universally recognized as the second language, at least for blind persons. It certainly will lessen the cost of the printing of the raised-type books: these can then be printed to a large extent in only one language, and will then be used all over the world. Moreover, many books which cannot now be printed at all, because of the small number of readers in any one nation, will then be procurable.

This is one reason why so many of the blind are interested in Esperanto. Another reason common to them and to the world is the possibility of exchanging ideas with persons of all nationalities.

The Perkins Institution for the Blind, Boston, Mass., was the first institution in this country where Esperanto was studied by the blind. A young man who learned his Esperanto there wishes to attend the Cambridge Congress as the blind delegate from America; he will pay half of his expenses, but he must look to the general American Esperanto public to pay the other half.

It is very important for the Esperanto cause that we should have a blind delegate at Cambridge. He will there meet forty or fifty blind delegates from Europe. The editor makes a *strong appeal* to the American Esperantists to help this good cause; send a dollar, if you can; even twenty-five cents will help. Make all money-orders payable to the Secretary of the American Esperanto Association.

In various newspapers and magazines can now be found many articles for and against Esperanto, and once more one reads the old worn-out arguments:—

“It is a dream.”

“It is impossible to add even one new word to a living language; how, then, can an entirely new language be introduced?”

“The different pronunciation of different races makes an international language impossible.”

“The national languages reflect the character of the races, and no race would give up its own tongue for that of another race.”

All these people who discuss the affair do not touch the heart of the matter. They are merely taking fright at goblins which they themselves have created.

Now and forever let us say to them that Esperanto does not aim to supersede national languages, but exists simply as an auxiliary language.

Further, for the sake of argument, let us put aside the fact that Esperanto is alive and growing; that men from far-distant lands actually converse freely; that the difference in pronunciation is almost unnoticeable, and certainly offers no hindrance; there still remains the ineradicable fact that in Esperanto a letter or advertisement can be written which any Esperantist in the whole civilized world can easily read, and to which any Esperantist can reply in a manner equally easy to be understood.

This fact, it seems to me, should silence all opposing arguments.

Possibly the style of the letter or the advertisement will differ from that of the reply. Possibly the European will write a letter in which will be found expressions which will seem strange to the eyes of an American accustomed to short vigorous expressions, free from circumlocution—but the fact remains that he can fully understand everything which his correspondent has written.

And to the world of commerce this solitary fact is sufficient. The commercial world does not care whether the works of Shakespeare and Goethe can be translated into Esperanto. It does not worry about microscopic grammatical differences in the usage of words. What it needs is not a means of literary expression, but solely a means by which commercial houses can communicate freely, easily, and in a manner that can be understood. Business letters make no pretensions to literary style—time and the

En diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj oni nun povas trovi multe da artikoloj por kaj kontraŭ Esperanto, kaj denove oni legas la malnovajn, eluzitajn argumentojn jenajn:

“Ĝi estas sonĝo.”

“Estas neeble aldoni eĉ unu novan vorton al lingvo vivanta; kiel do oni povas enkonduki tutan novan lingvon?”

“La malsama elparolado de diversaj gentoj nebligas lingvon internacian.”

“La lingvoj naciaj rebrilas la karakteron de la gentoj, kaj nenia gento forlasus sian propran lingvon por tiu de alia gento.”

Ĉiuj tiuj ĉi diskutantoj tute ne tuŝas la koron de la afero. Ili nur timas pri la koboldoj, kiujn ili mem estas kreintaj.

Nun kaj por ĉiam, ni diru al ili: Esperanto ne celas anstataŭi la lingvojn naciajn, sed ekzistas nur kiel helpa lingvo.

Plie, pro argumento, ni metu flanken la faktojn: ke Esperanto vivas kaj kreskadas; ke homoj el tre malproksimaj landoj efektive povas interparoli libere; kaj ke la malsameco de la elparolado estas preskaŭ nerimarkebla, kaj certe ne estas barilo; restas ankoraŭ la neelviŝebla fakto ke, per Esperanto, oni povas skribi leteron aŭ reklamon, kiun ia Esperantisto en la tuta mondo civilizita povas facile legi, kaj al kiu ia Esperantisto povas respondi en maniero egale facile komprenebla.

Tiu ĉi fakto, tiel ŝajnas al mi, devus silentigi kontraŭajn argumentojn.

Eble la stilo de la letero aŭ la reklamo diferencas de tiu de la respondo. Eble la eŭropano skribos leteron kie oni trovos esprimojn kiuj ŝajnos strangaj al la okuloj de amerikano, kiu estas al kutimita al mallongaj, fortegaj, sencirkaŭfrazaj esprimoj—sed restas la fakto, ke li tute povos kompreni ĉion kion skribis lia korespondanto.

Kaj al la mondo komerca, tiu sola fakto suffiĉas. La mondo komerca ne zorgas pri ĉi tio, ĉu oni povas traduki esperante la verkojn de Shakspeare aŭ Goethe. Ĝi ne zorgas pri mikroskopaj gramatikaj diferencoj inter la uzado de vortoj. Tio kion ĝi bezonas ne estas rimedo de literatura esprimo, sed sole rimedo per kiu komercaj firmoj povas interkomuniki libere, facile, kaj kompreneble. Komercaj leteroj faras neniajn pretendojn pri literatura stilo—la tempo kaj la bezono mankas. Sufiĉe

need for it are both lacking. It is sufficient that such a letter should convey only one meaning without the possibility of being misunderstood.

With Esperanto such a letter can be written. With Esperanto, where one word always conveys the same meaning, one cannot possibly be misunderstood. And with Esperanto the business world can communicate in one language instead of in several.

It is a new time-saving machine, and the commercial world always welcomes such devices. And after only a very few years of test the commercial world will unfailingly adopt the Esperanto language, just as it adopted the typewriter, the telephone, and the other wonderful inventions that have so greatly lightened the labors of humanity.

We Esperantists have our own aims for our dear language, but let us keep such aims to ourselves. Our altruism is an unknown language to the world of commerce. Let us therefore talk only about the dollars and cents—that (subject) the world of commerce understands, and in that it takes interest. There are many good, strong convincing commercial reasons in favor of Esperanto—let us use them whenever the opportunity presents itself.

Originale verkita por la Amerika Esperantista *Jurnalo de W. S. Hamburger* (A. E. A. 296), Baltimore, Md.

The Cambridge Congress will last officially from the 12th to the 17th of August. However, lodgings, etc., will be provided for those who arrive on the tenth or eleventh. If you go thus early, you will get a chance to hear Divine Service conducted in Esperanto.

The ticket which admits one to all sessions of the Congress costs \$2.50. If you send for one before the fifteenth of June you will receive a Congress Guide-Book free. Three different classes of accommodations will be provided in order to meet the varying size of the pocket-books of the Kongresanoj.

Make all money-orders payable to Secretary of British Esperanto Association, 13 Arundel St., Strand, London, W. C.

estas, ke tia letero alportas nur unu signifon, sen la ebleco malkompreniĝi.

Per Esperanto oni povas skribi tian leteron. Per Esperanto, kie unu vorto ĉiam portas la saman signifon, oni ne povas eble esti malkomprenata. Kaj per Esperanto la mondo komerca povas interkomuniki per unu lingvo anstataŭ per kelkaj.

Estas nova, tempoŝparanta maŝino, kaj la mondo komerca ĉiam bonvenas tiajn ilojn. Kaj post nur tre malmulte da jaroj de pruvado, la mondo komerca nepre alprenos la lingvon Esperantan, kiel alpreniĝis la skribmaŝino, la telefono, kaj la aliaj mirindaj elpenaĵoj, kiuj tiel multe malpezigis la laborojn de la homaro.

Ni Esperantistoj havas niajn proprajn celojn pri nia kara lingvo—sed tiajn celojn ni tenu por ni mem. Nia altruismo estas por la mondo komerca nekonata lingvo. Ni do parolu sole pri la dolaroj kaj la cendoj—tion la mondo komerca komprenas, kaj pri tio ĝi interesiĝas. Ekzistas multe da bonaj, fortaj, konvinkigantaj komercaj argumentoj por Esperanto—ni uzu ilin kiam ajn la okazo sin prezentas.

Do not forget the Delegation for the choice of an International Language. Read again the article about it in the March number of the Journal. Send for some of the papers in regard to it to any university professor whom you think that you could get interested in the subject. Above all things, get Chambers of Commerce, Boards of Trade, and Scientific Societies interested in the matter. Vekiĝu ni.

The address of the Secretary of the American Committee is: J. F. Twombly, 34 Green St., Brookline, Mass.



PENSOJ PRI ESPERANTO

Tio, kio estas eltrovita de Ludoviko Zamenhof estas pli principo ol lingvo—la principo de simpleco uzata en ĉio, kio apartenas al l'esprimo de pensoj. Uzate en ortografia, ĝi postulas perfektan fonetikecon per alfabeto facile elparolebla de ĉiaj homoj. Nenia malfacila denta aŭ barbara gorĝa litero povas esti enlasata; kaj la malpermeso ke la vokaloj estu pli ol la tutmondaj mezlongaj kvin vokaloj certigas, ke oni faros samajn sonojn en Rumanujo kaj Nebraska, kiel ĉe Harvarda Universitato.

Simila eklektemeco postulas la plej bonajn vortojn. Kvazaŭ do multekostaj metaloj, ili estas fositaj el ĉiaj landoj, stampitaj en la Esperanta Monfarejo, kaj tiam libere uzataj kiel iloj de pensinterŝanĝo, memstare aŭ en kunmetaĵoj. Uzate en sintakso, simpleco postulas, ke la vortoj estu kunigataj laŭ unu sola leĝo, nome, ke la pensitaĵo estu klare esprimita.

La ellaborado de tiu ĉi principo devas fine fari lingvon de mirega beleco. Efektive tia jam Esperanto estas—ankoraŭ en sia *infaneco*. Kiel lingvo, ĝi havas tri proprajojn: ĝi estas facila, ĝi kondukas al ĝenerala lingvistudo, kaj ĝi tradukas ĉiajn aliajn lingvojn senlabore kaj ĝuste.

La sperto montras, ke Esperanto estas dekoble pli facila por lerni (aŭ pli bone, unudekone malpli malfacila) ol ia ajn natura lingvo. Estas maljustege ĝin enordigi kun Volapŭko. Tiu ĉi estis barbara en sono kaj preskaŭ neellernebla.

Plie, Esperanto estas stimulo al la studado de aliaj lingvoj. La demando estas farita: "Kio estas gajnata per sistemo signala, kiu helpas Kongresojn kaj komizojn kaj vojaĝantojn, se ĝi malpliigas la nombron da ili, kiuj povas ĝui la lingvon de Ŝekspir kaj Goethe kaj Moliere kaj Dante?" Kial tamen knabo

ekstudinta lingvojn per la Zamenhofaj *Vort-Lecionoj* haltos ĉe ili? Ne; ili estos la plej forta helpo en liaj pli malfruaj studoj, ĉar la regulaj deklinacioj, la diversaj finiĝoj por la diversaj specoj de vortoj, kaj la tridek sufiksoj, baldaŭ lernigos al li la esencojn de l'tutmonda gramatiko.

Plie, la kono kun iom da fremdaj vortoj ekscitos sciemecon pri pli multaj. Posedante grandan proporcion da en ĉiuj lingvoj trovataj vortoj, Esperanto igas la studon de ili ŝajni facila. Aperas al la skribanto, ke Esperanto venos al milionoj kvazaŭ anĝelo, ilin vekante al la plezuroj de literaturo.

Trie, tiu ĉi arta lingvo estas nekomparebla ilo por traduki. Doktoro Vallienne en la antaŭparolo al sia traduko de la Eneido, diris: "Ĝi ne nur ebligas trakonduki la sencon de fremda teksto tra la reto de ĝiaj vortoj kaj frazoj, por tien ĝin fiksi, sed ankaŭ ĝi eniras profunde en la intimecon mem de tiu lingvo, kaj rebriligas ĝian propran *genion*. Tial, dank'al ĝi, ĉiu homo povas ne nur koni la sencon de ĉio, kio estas skribita divers-lingve en la tuta mondo, sed ankaŭ li povas ĝui tiun delikatan plezuron: *legi*, sur la teksto mem, *lingvon kiun li ne konas*."

La vidotaĵo ĉi tie proponata estas nelimebla. Eĉ detenate per manko da spaco, ni almenaŭ povas havigi al ni unu ekzempleron. Se libro pri tertremoj aŭ militaj malsanulejoj estus samtempe verkata Japane kaj tradukata Esperante, iu scienculo aŭ militistestro, Brita, Germana aŭ Franca, povus lerni legi ĝin dum multaj tagoj.

La vojiranto, al kiu oni estas dirinta, ke Esperanto estas mirinda lingvo, post vizito al ĝia templo ekkrios kun la reĝino de Seba, "Estis vera rakonto, kiun mi aŭdis en mia propra lando; jen, la *duono* ne estis dirata al mi!"

ESTU ZORGA PRI LA ELEKATO DE ESPERANTAJ VORTOJ

Mi *vivas* en la unua *rakonto* de mia domo, kie, dum la somertempo la *flugoj* nin ĉagrenas tre multe, sed poste en la *falo* de l'jaro ili malaperas.

Mutaj *glutoj* ĉiam *muŝas* ĉirkaŭ kaj apud nia domo.

Mia filino havas *ĝustan* vizaĝkoloron, kiu, kompreneble, faras ŝin blonda, kaj ŝi ankaŭ havas malgrandajn *futojn*, longan *serurojn* da haro, kaj *ŝiparan* movadon.

Ĉiumatene ŝi manĝas tri *rulojn* da pano, ofte sidigas en *ŝtonega* seĝo kaj *ŝtonegas* sin, kaj kelkfoje eĉ *haŭtas* sin en sia *spaco* por eviti endoman *verkon*.

Lastan *risorton* ni iris *lanugon* en kampon kie *printempo* de akvo fluas, sed *ŝela* hundo, kiu estis *mensoganta* apude, devigis nin *laŝi*. Tial ni tuj piediris hejmen, kaj tie trovis *reston* por niaj korpaj.

Tiun ĉi verkis W. M. Ampt, Cincinnati, Ohio.

This "spritajo" is due to the fact that English is full of words of different meanings, which are both "*spelled*" and *pronounced alike*. The proper translation of some of these words follows:

Loĝadas—etaĝo—muŝoj—aŭtono.

Hirundoj—flugas.

Konvenan—piedojn—buklojn—rapidan.

Bulkojn — balanciga — balancigas — kaŝas —ĉambro—laboron.

Printempon—malsupren—fonto—bojanta — kuŝis—ripozon.

Advice: 1) Do not translate English words literally. Think of the *real meaning* of the thought that you wish to express.

2) Look up every word in both the English-Esperanto and the *Esperanto-English* dictionaries.

MALTROVITA EN SUPRENIRO?

La redaktoro de gazeto en malgranda orienta urbo havis okazon viziti Vaŝington unu aŭ du tagojn post la tempo, kiam prezidanto McKinley estis mortigita, kaj li multe miradis la afiŝojn kiuj enhavis la horan kondiĉon de la prezidanto. Post lia reveno li tuj farigis kaj starigis antaŭ sia oficejo afiŝan tabulon. Dum kelke da tempo li ne havis okazon uzi la tabulon, sed la okazo venis, kiam diakono Jones, unu el la ĉefaj viroj de la urbo, malsaniĝis. Jen la maniero, kiel la tabulo aperis:

Lundo, 10 A. M.—Diakono Jones tre malsana.

Lundo, 1 P. M.—Diakono Jones iom pli bona.

Lundo, 5 P. M.—Diakono Jones pli malbona.

Mardo, 9 A. M.—Diakono Jones multe pli malbona. Familio estas kunvokita.

Mardo, 11 A. M.—Diakono mortis kaj iris al ĉielo. Funebro ĉe 3 P. M.

Kiam la plorantoj revenis de la funebro, ili estis surprizitaj per alia noto, kiun ia ŝercanta vojaĝisto estis farinta:

Mardo, 5 P. M.—Granda ekscito en ĉielo. La Diakono Jones ankoraŭ ne alvenis.

REV. CARL HEYL, Monticello, Wis.



A WORD OF ADVICE TO BEGINNERS

“Mi sendas la enfermitaj artikoloj por la Esperanto Journalo, se vi ilin trovas uzeble. Mi trovas ion tute nova en Esperanto,—spiriton, senton de frateco, proksimeco al aliaj nacioj kaj popoloj *ke* mi ne trovis en aliaj lingvojn. Mi esperas ke tiu ĉi estas ĉenero en ĉeno *ke* kunligas la tuta mondo.”

We have taken the lines just quoted from a letter which accompanies a number of translations of jokes and stories. We heartily approve the sentiment of the letter: Esperanto is not merely a language, but a means of promoting universal brotherhood—and this, its ideal side, is what appeals most to many Esperantists.

However, in order to reach the ideal side, we must first master the practical side. Now, although Esperanto is comparatively easy to learn, it has certain grammatical rules, and these must be observed.

For instance, every direct object is put in the n-case. “Mi sendas ĝin,” “mi amas lin,” “mi sendas la enfermitajn artikolojn.”

Again, the adjective (unless in the predicate) agrees with the noun in case: therefore one should say, “Mi trovas ion tute novan.”

“En aliaj lingvoj” is the correct rendering. Prepositions are always followed by the nominative case, unless there is some special reason for the n-case. Full explanations of the use of the n-case are to be found in the March number of the journal.

There are mistakes in regard to the use of the “*ke*.” This would have been avoided if the writer had carefully studied the remarks about “that” in the February number. Remember

that “that” and “should” and “would” are very ambiguous words. English uses these words in several different senses.

We should advise all learners to rewrite this letter. The correct rendering of it will appear in the next number of the journal.

A word of advice to all who send matter to the Journal. You cannot write *good* Esperanto until you have first *mastered* Bullen’s Lessons, and then have read at least *one hundred pages of good Esperanto prose* (Krestomatio or Pola Antologio).

Again, jokes and humorous stories are very difficult things to translate into another language. They are generally full of idiomatic expressions, and at the same time often omit words essential to the thought from a logical standpoint. The same thing can be said of poems. Therefore, put poetry and jokes out of your mind until you can write good letters and good descriptive prose.

The American Esperanto Association and the American Esperanto Journal are not commercial organizations. The officers, the editors, *give freely of their time and money*. All profits, after expenses are paid for, are devoted to the “propaganda” of Esperanto. The Assistant Secretary, who gives his whole time to the work, is paid a small salary. Both he and the other officers are overburdened with work. In the last week in March, for instance, the Assistant Secretary by himself handled 97 postal cards and 190 letters. We therefore ask our readers to be patient in regard to delays.



NE ESTAS MORT'

1.

Ne estas mort'! En zon' pli bela
 Stel' subirinta releviĝas;
 Per stela kron' la frunt' ĉiela
 Je ĉiam ornamig'as.

2.

Ne estas mort'! Sub maj-pluvetoj
 Naskiĝos el mallumo tera
 Mirindaj fruktoj aŭ floretoj
 Aŭ riĉo or-grenera.

3.

Malsatan muskon nutradante,
 Granit-ŝtonegoj ekpolviĝas,
 Kaj vivon el l' aer' ĉerpante
 L'arboj malsoifiĝas.

4.

Ne estas morto! Bed' sen floroj,
 Arbar' malgaja kaj glacia
 Atendas nur, dum vintraj horoj,
 Gis venos Maj' ilia.

5.

Ne estas mort'! Anĝel' paŝanté
 Sen bru' tra ĉiuj landoj iras,
 Karulajn florojn eltirante.
 "Ekmortis li," ni diras.

6.

Kaj nun ni fleksas nin kaj ploras,
 De l' plej amataj senigitaj,
 Dum ili brile reekfloras,
 Ĉielon transplantitaj.

7.

La voĉ' arĝenta, kies sonoj
 Konsolis ofte nian aron,
 Nun resonigos dum eonoj
 La verdan viv-arbaron.

8.

Kaj kiam ie kor' ridetas,
 Senkulpa kiel floro juna,
 Li ĝin sublevas kaj portetas
 Al land' eterne suna.

9.

Kaj kvankam ŝajne foririnte,
 La karaj baldaŭ nin revidos,
 Kaj ĉiujn pekojn forĵetinte,
 Dolĉege nin alridos.

10.

Senmorta, nevidebla rondo
 Nin dume ĉirkaŭadas ĉie;
 Vivegas ja la tuta mondo—
 Ekzistas mort' nenie!

*El l'angla originalo de J. L. McCreery tradukis
 O. Haux Mayer (Chicago).*

ANSWERS TO CORRESPONDENTS

Compound words. Generally speaking, Esperanto has endeavored to avoid "doublets." No two roots have the same form; when there is danger of this, one of the roots is slightly changed; for example, "ordono," "ordeno."

However, a one-syllabled root with an affix may chance to have the same form as a two-syllabled root of an altogether different character: for example, "barbaro"—a collection of beards; "barbaro"—a barbarian. Still these cases are rather rare, and the rest of the sentence will usually prevent any misconception of the meaning.

A correspondent has sent us thirty such words, or words which at first sight seem to fit into this category. The great majority of them, however, are not such words; they are not Esperanto words at all, but are formations based upon a misconception of the meaning and uses of some of the suffixes.

For instance, half of the words mentioned by him are formed with the suffix "er." He writes "kolero"—a piece of a neck; "partero"—piece of a share; "vespero"—piece of a wasp, etc. Now "er" does not mean a "piece" or a "part"; "peco" and "parto" are the proper translation of those words. "Er" means something *complete in itself*; or, as Bullen puts it, "er" denotes a *unit*. It is properly used in the following words: "hajlero" (a hail-stone), "polvero" (a grain of dust), "ĉenero" (a link of a chain).

